Agadraporto de Esperanto Nederland pri 2022

1. Banko/kapitalo
Esperanto Nederland havis deficiton de la kapitalo 2022 de €4.419. La ĉefa kialo estas la kostoj por la Amsterdama katedro kaj pli altaj kostoj por Fenikso, la membrokunveno kaj la studsemajnfinoj ol buĝetitaj.
La propra kapitalo de la asocio estis je la 31° de decembro 2022: € 93.364
La deficito estas 4,5% inkluzive la kostojn por la Amsterdama katedro.
Raportas Loes Demmendaal

2.1. Estraro
La estraro konsistis en 2022 el:
Prezidanto, Marc van Oostendorp, li estas elektita dum la jarkunveno 2022.
Peter van Noorden, membro, estas elektita dum la jarkunveno 2022
Loes Demmendaal estas re-elektita ĝis 2025. Estas ŝia tria periodo.
Ineke Emmelkamp estas sekretario (ĝis majo 2024)
Andries Hovinga forlasis la estraron dum la jarkunveno 2022.
La estraro kunvenis 5 fojojn (4 pere de Zoom kaj 1 fizike en Utrecht. Okazis multaj kontaktoj pere de retmesaĝoj kaj telefonalvokoj,
Rob Groeneveld ĉeestis la estrarkunsidojn kaj faris la raportojn, Korine Cheizoo regule partoprenis en diskutoj kaj lanĉis ideojn.
Esperanto Nederland havas pagitan konton ĉe Zoom. La estraro kaj la organizantoj de la kunvenoj de la Amsterdama Rondo uzas ĝin. Bert de Wit uzas ĝin por doni interretajn kursojn.

2.2. Privacybeleid Esperanto Nederland
La teksto pri la politiko rilate privatajn aferojn troviĝas en la retejo de Esperanto Nederland.

2.3 Membrokunveno
La 31-a ĝenerala kunveno okazis la 21an de majo en la Partycentrum Floor en Lunteren. La asocio regalis la ĉeestantojn per lunĉo. Post la kunveno Leston Buell prizorgis la posttagmezan programon. Li prezentis Artan Atelieron – simplaj floroj. Per nigra inko kaj akvofarbaj krajonoj la membroj faris tre belajn desegnojn.

2.3.1 Membroj
La administradon de membroj prizorgas Koos Scharroo. Li sendas bonvenigan paketon al novaj membroj, disponigas aktualan adresaron al la ekspedisto, kiu dissendas Fenikson, kaj li informas la estraron kaj redakcianojn de Fenikso pri ŝanĝoj en la membraro.
Laŭmende li havigas publikan membroliston, prefere en cifereca formo pro mediprotektaj kialoj.

MUTATIES	**aantal**	
BESTAND 1-1-2022	213	

NIEUWE LEDEN	16	
OPZEGGINGEN, ROYEMENTEN	-10	
OVERLEDEN	-5	
BESTAND 31-12-2022	**214**	
LEEFTIJDEN		**%**
< 30 JAAR	**5**	2,34%
30 T/M 69 JAAR	**106**	49,53 %
≥70 JAAR	**101**	47,20 %
GEEN OPGAVE	**2**	0,93%

Raportas Koos Scharroo

2.4. Arkivo Esperanto Nederland – Internacia Instituto por Socia Historio (IISG)
Dum tiu ĉi jaro estis kelkaj telefonaj kontaktoj kun la IISG. En mia hejmo estas arkivoj el Leiden. Promesitajn dokumentojn de elstara esperantisto mi atendas. En la sekvonta jaro mi havigos plian aldonon al nia historio ĉe IISG.
Raportas Ans Bakker-ten Hagen.

2.5. Biblioteko Universitato de Amsterdamo
La asocio decidis ke ĉiun jaron ni donacas valorajn librojn al la Bibilioteko, maksimume € 100,-- jare.
En 2022 ni donacis la libron:
Plena Vortaro Esperanto-Germana en du volumoj / Vollständiges Wörterbuch Esperanto-Deutsch in zwei Bänden de Erich-Dieter Krause
Prof. Federico Gobbo transdonis la libron al la biblioteko.
Raportas Ineke Emmelkamp

2.6. Komerca Ĉambro
La asocio estas oficiale registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Amsterdamo. La registriĝo estas senpaga.

3.1. Kaskontrolo
La kaskontrola komisiono konsistis el Simon Smits kaj Ronaldo Nobel kiuj raportis dum la jarkunveno pri la jaro 2021. La nova kaskontrola komisiono konsistas en Ronaldo Nobel kaj Smaranda Tintu. Rezerva membro estas Ans Bakker-ten Hagen.

3.2. Arbitracia komisiono
Anneke Schouten-Buijs estis membro ĝis 2022. Ŝi estas reelektita por nova trijara periodo (ĝis 2025).
Marc van Oostendorp forlasis la komisionon, ĉar li fariĝis prezidanto.
Johan Swenker estas membro ĝis 2023.La nova membro fariĝis Hiddo Velsink (periodo 2022-2025).
Ans Bakker estas rezerva membro.
En la jaro 2022 ne necesis agi.

3.3. Verloren van Themaatpremio
Ni ne aljuĝis la premion por la jaro 2021.
Raportas Loes Demmendaal

4. Informado
En 2022 mi ricevis malmultajn mesaĝojn. Nur 30 homoj petis per la reto sendadon de paperaj informoj. En 2021 mi sendis 43 kovertojn.
Esperanto Nederland posedas du grandajn starantajn informilojn, kiujn mi uzis i.a. dum la kultura tago en Woudrichem. Pluraj membroj petis stokon de nia informmaterialo por disdoni.
Marc van Oostendorp estis intervjuata de landaj radiostacioj (Villa VdB en BertOp5) post sia elekto kiel prezidanto. Redaktoro de 'EenVandaag Online' faris intervjuon kun kvar partoprenantoj de la studosemajnfino kaj kun Marc van Oostendorp.
Raportas Ineke Emmelkamp

5. Instruado

5.1 Katedro Interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo.
La universitata kurso de Esperanto de la akademia jaro 2022-2023 okazis ĉeeste, samkiel la antaŭpandemia epoko. Malgraŭ ke surpapere aliĝis 22 studentoj, prezentiĝis enklase nur 8. Por la unua fojo, unu studento maltrapasis la ekzamenon. Duono el la studentoj estis nederlandanoj, la alia duono venis de Germanio aŭ orienta Eŭropo. La katedrulo estis invitita kiel gasto por prelegi pri la Esperanto-Movado en Nederlando, Ĉinio, Japanio el diversaj universitatoj tra la mondo, ĉeeste aŭ virtuale. Li publikigis esplorrezultojn kiel kutime. Plendetala jarraporto estos sendita kopie porkone al la estraro de Esperanto Nederland en januaro 2023. Esperanto Nederland finance kaj morale subtenas la katedron.
Raportas la katedrulo prof-ro d-ro Federico Gobbo

5.2. Studosemajnfinoj

Post pandemia interrompo estis granda ĝojo denove okazigi niajn tradiciajn studosemajnfinojn en 2022. La unua okazis je la 25-27a de marto. Tamen la kronviruso ankoraŭ influis ĝin. Unue, ĉar ni decidis akcepti malpli da partoprenantoj ol antaŭe, por ke ni kunsidu malpli dense kaj disponu pri pli da persona spaco en la dormejoj. Due, kaj pli grave, ĉar unu el la kuirejaj stabanoj lastmomente testiĝis pozitive, tiel ke ŝia kolegino devis labori pli forte (feliĉe kelkaj partoprenantoj pretis asisti). Malgraŭ ĉi tiuj malhelpoj oni baldaŭ retrovis la konatan agrablan etoson de la studosemajnfinoj kaj preskaŭ forgesis la dujaran paŭzon! Ĉeestis 26 studantoj, inter kiuj 11 novuloj. Ilin instruis Roel Haveman, Bert de Wit, Fransuaz Pellegrin, Lode Van de Velde kaj Piet Glorieux.
La dua studosemajnfino de 2022 okazis je la 14-16a de oktobro, nun denove kun kutima nombro da partoprenantoj (36, inter kiuj 15 novuloj). Pro kaŭzoj ne tute klaraj estis pli malfacile ol iam antaŭe kompletigi la instruan teamon. Feliĉe ni finfine sukcesis, kaj la pozitiva rezulto estis, ke tiel ni varbis novajn instruistojn kaj ankaŭ trovis plurajn interesatojn por posta kunlaboro. Ĉi-foje instruis Rob Groeneveld, Roel Haveman, Bert de Wit, Geomar Martínez Pérez kaj Paweł Fischer-Kotowski.
La organiza teamo daŭre konsistas el Lilian van der Burgt, Ineke Emmelkamp kaj Arjen-Sjoerd de Vries. La konstanta ejo de la studosemajnfino estas la naturamika domo Krikkenhaar apud Almelo, kie ni senpage povas lasi niajn aĵojn en la mansardo.

6. Fenikso
Ses numeroj de Fenikso estis publikigitaj en 2022. Papere tiuj ĉi revuoj estis senditaj al membroj. Fenikso ankaŭ estis sendita al kelkaj pluraj adresoj eksterlande. Unu monaton post la eldono de la numero, ĝi estis ankaŭ metita en la retejon de Esperanto Nederland.

Regulaj rubrikoj en Fenikso estis “De la estraro” kaj “Bonvenon”, preparitaj de Ineke Emmelkamp, “Revuo-interŝanĝo”, preparita de Benata Hengstmengel-Koopmans, “Lingva Testeto”, preparita de Arjen-Sjoerd de Vries, kaj “Vortserĉenigmo”. Ĉi tiu lasta rubriko estis farita fare de Frank van Hertrooij kaj ĝi estis transprenita fare de Det Koning ekde numero 6 2022. Fenikso enhavis invitojn de kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj en Nederlando kaj eksterlande. Ĝi ankaŭ plurfoje raportis pri kiam Esperanto aperis en la Nederlandaj gazetoj kaj en la radio.

Kelkaj artikoloj el la riĉa enhavo, kiujn mi ŝatus mencii, estas: la jubileoj de s-ro Carel Boerlijst kaj s-ino Teunie Schonewille-Roos, la prelego de Silvia Pilger pri ŝia vivo kiel denaskulo, spertoj pri de la studsemajnfino en marto 2022, la desegnaĵoj de la partoprenantoj de la arta ateliero, kiun Leston Buell instruis, kaj la bela Kultura Tago en Woudrichem. Ankaŭ pluraj artikoloj temis pri paco kaj pri la atako de Rusio kontraŭ Ukrajnio.

Krom la konstantaj teamanoj Ineke Emmelkamp, Andries Hovinga, Marko Konijnenberg, Bert de Wit kaj mi, multaj membroj helpis, igante Fenikson denove fierinda revuo en 2022.
Raportas Foppe-Klaas Hovinga, ĉefredaktoro

7. Interreto

7.1. Retejo Esperanto Nederland
En 2022 la asocio estigis planon konstrui novan retejon. La nuna ekzistas jam multajn jarojn, de la tempo kiam ĉiuj havis (aŭ eĉ ne havis) poŝtelefonon de firmao Nokia, nur por telefone paroli. Hodiaŭ ne ĉio en la retejo estas bone legebla per modernaj plurfunkciaj poŝtelefonoj. Pro tio la bezono konstrui retejon tute novan. Kunlaborantoj ankoraŭ ne estas konataj, sed la estraro okupiĝas pri formado de laborgrupo.
Raportas la retejestro Frans Schild

Intertempe laborgrupo komencis pripensi tion, kaj kunvenis kelkajn fojojn.
Raportas Marc van Oostendorp

7.2. Sociaj komunikiloj
La sociaj komunikiloj de Esperanto Nederland konsistas el: Fejsbuka paĝo, Tvitera-konto, Jutuba kaj Telegrama kanaloj (vidu paĝo 2 de Fenikso por la adresoj). Ni publikigis tie preskaŭ ĉiutage anoncojn, raportojn kaj fotojn pri Esperanto-aranĝoj en Nederlando kaj la plej interesajn novaĵojn pri internaciaj Esperanto-eventoj en kiuj ĉeestas Esperantistoj el Nederlando. La afiŝoj de Tvitero estas videblaj ankaŭ en fenestro (plugin) en la ĉefa retpaĝo de la retejo de Esperanto Nederland. Administrantoj de la sociaj komunikiloj: Andries Hovinga kaj Joost Franssen. Kunlaboris: Ineke Emmelkamp.
Raportas Andries Hovinga

8. Universala Esperanto Asocio (UEA)
Dum la jaro 2022 ni ne havas komitatanon ĉe UEA. Ni ne trovis kandidaton.

9. Eŭropa Esperanto-Unio (EEU)
Esperanto Nederland ne plu estas oficiala partnero en tiu ĉi organizo. Ni ne plu pagas kontribuon.
Raportas Ineke Emmelkamp

10. Faka sekcio NGGE - Nederlanda Grupo de Geinstruistoj Esperantistaj.
La prezidanto estas Rob Moerbeek, la sekretario/kasisto/protokolanto estas Simon Smits. Ili kontaktas unu la alian ĉefe per telefono kaj komputilo.

NGGE havas 10 membrojn kaj unu komitatanon ĉe Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). La redaktoro de la bulteno ‘NGGE sciigas’ estas Simon Smits. Rob Moerbeek kunlaboras. Ĝi aperas

trifoje jare (februaro, junio kaj oktobro) kaj enhavas kutime 4 ĝis 16 paĝojn. Niaj membroj ricevas ĝin kaj krome s-ro prof.o d-ro Federico Gobbo en la Universitato de Amsterdamo, la Esperanto-muzeo en Aŭstrio kaj la Kuba sekcio de ILEI.

Esperanto estas instruata kaj lernata en Amsterdamo (de prof.Gobbo). En la lando homoj povas lerni Esperanton per la reta kurso 'Pingveno', tre bona kurso, kaj dum la studosemajnfinoj. Krome Bert de Wit gvidas retan kurson. En la klubo de Vlissingen kelkaj personoj sekvas tian kurson kaj oni pritraktas ĝin ĉeeste en la biblioteko de Vlissingen. Certe en aliaj lokoj en la lando oni ankaŭ faras tion. La prezidanto en majo en kunveno de pacorganizoj prezentis kelkajn Esperanto-tekstojn ("Pacrakontoj" de Pausewang; "Ĉukpilko" el "Kontakto").
Raportas Simon Smits

11. Regionaj grupoj
Grupo de homoj povas unuiĝi kaj sekve iri al notario por ekhavi juran staton. Poste sekvas enskribiĝo ĉe la Ĉambro de Komerco (Kamer van Koophandel). Tia asocio devas sekvi la regulojn de la Civila Kodo (Burgerlijk Wetboek). Esperanto Nederland estas tia asocio, kiu povas fondi sekciojn, kiuj mem ne havas juran respondecon. Tiaj sekcioj funkcias sub la plena respondeco de la (ĉef)estraro. Ĝis nun ni ne konsciis pri la financa respondeco, kio signifas ke ĉiu sekcio devas ĉiujare detale raporti al la estraro pri siaj financoj. La estraro tial decidís ke lokaj kluboj kaj aliaj grupoj ne estu oficialaj sekcioj, sed memstaraj organizoj, kiuj mem prizorgas sian financan aŭtonomecon. Konkrete ne multe ŝanĝiĝos, ĉar kompreneble Esperanto Nederland daŭre kunlaboros kun ĉi tiuj grupoj.

11.1 Alkmaar
La estraro konsistas el: S-ino Tiny Droge, prezidanto kiu demisios en 2023. S-ino Margot Koopmans, vic-prezidanto. Ŝi demisios en 2024. S-ro John Droge, kasisto. Li demisis en 2022 sed estis reelektita. La estraro kunvenis 5 fojojn. Ni kunvenis en la kvartaldomo de Alkenhorst. Meznombra nombro da partoprenantoj: 12 personoj. La nombro de membroj je la 31-an de decembro 2020: 20. Klubkunvenoj: 2 foje. (en septembro kaj en oktobro) Ni nuligis la kunvenojn ĝis la fino de la jaro pro la kronvirusa pandemio. La kluba bulteno, 'Fromaĝokloŝo', aperis 3 fojojn, prizorgita de Vinus Lathouwers. Ni sendis nian klubrevuon " Fromaĝokloŝo" al nova membro kaj eksterlande al niaj ĝemelurbkluboj.
Nia ĥoro Malvo konsistas el 10 membroj, inkluzive la dirigentinon Marijke Lathouwers.
Raportas Tiny Droge kaj Margot Koopmans

11.2 Esperanto Klubo Eindhoven (EKE)
EKE havas 10 membrojn kaj kunvenis 9 fojojn. En januaro ne eblis kunveni pro la kronviruso.
Ni laboris pri poemoj, ni parolis pri niaj plej ŝatataj libroj, ni faris vortpuzlojn, ni parolis pri literaturo. Post la ferioj ni parolis pri niaj someraj spertoj, Rob parolis pri la proverbaro kaj ni devis diveni pri kiu kaŝita objekto iu parolis. En decembro ni havis kiel kutime nian Zamenhoffeston. Eĉ nia privata bakisto venis por tiu festo. Kun kuko kompreneble!
Ni povas konkludi ke ni denove havis interesajn kunvenojn, kvankam la nombro da partoprenantoj malrapide malkreskas. Sed niaj vesperoj ĉiam estas agrablaj. Se vi ne kredas min, mi invitas vin partopreni foje. Ni certe bonvenigos vin! Niaj kunvenoj ĉiam estas en la 3-a merkredo de la monato, escepte en julio kaj aŭgusto.

Plia agado de niaj membroj:
Kelkaj partoprenis al la Beneluksa kongreso, al germanaj kunvenoj (Kokolores, GEK kaj Luminesk'), al la studsemajnfino kaj al PRINTempaS en Grésillon.
Karina Scharff prizorgis programeron dum la posttagmezo de la kultura tago en Woudrichem. ŝi tradukis kun la partoprenantoj kelkajn poemojn. Kelkaj membroj partoprenis al tiu ĉi tago.
Dum la 4-taga marŝo en Nijmegen partoprenis membro portante esperantan flagon kaj T-ĉemizon.

Nia kutima ekskurso kun la germanoj (TREPEKE) ankoraŭ ne okazis post la kronvirusa tempo. Espereble ĝi okazos denove en 2023.
Raportas An Olijslagers

11.3 Noord-Nederland
La 31an de decembro 2022 ni havis 22 membrojn, inkl. unu honoran membron Wil van Ganswijk. Ineke Emmelkamp restis prezidanto/sekretario kaj Richard Hofman prizorgadas la financojn kaj li regule faras novaĵleteron: La Steleto. Bedaŭrinde ni ne organizis informbudojn. Gonda Kruijer fidele sendas al niaj membroj gratulkarton okaze de naskiĝtagdatreveno.
Ni regule kuvenis (4 foje fizike kaj 5 foje pere de Zoom). En la somero ni organizis matenajn kunvenojn en Groningen (en la restoracio Scandinavisch Huis kaj en la nova moderna ejo Forum). Interesa ekskurso okazis en Leeuwarden. Ni babilis, boatekskursis kaj manĝis en agrabla etoso. La landa asocio organizis kune kun Germana Esperanto Asocio 'konkluda kunveno' en Groningen. Venis gastoj el Germanio kaj kelkaj el niaj membroj el Noord-Nederland ĉeestis.
Kutime ni kunvenis en la ejo de la Dreesflat, sed la luprezo fariĝis tro alta. Ni nun decidis kunveni ĉe iu hejme.
Raportas Ineke Emmelkamp

11.4 Haarlem
En la 19a de majo ni kunvokis la membrojn por priparoli la situacion de la sekcio. Bedaŭrinde, pro la ventego en la posttagmezo, pluraj personoj ne povis veni. Tial ni ankaŭ ne povis oficiale decidi malfondi la sekcion. Sed ni tamen jam transpagis la monon el la ING-bankokonto al la bankokonto de Esperanto Nederland kaj nuligis la ING-konton kiu fakte estis nur malprofita al la sekcio. La membroj kiuj jes ĉeestis, estis Tanja van Huis, prez.ino kaj kasistino, Bert de Wit, sekretario, kaj Rob Moerbeek, membro.
Post tio, fakte la sekcio ne plu ekzistas, sed Bert de Wit fariĝis kontaktpersono por Harlemo kaj ĉirkaŭaĵo.
En la 16a de majo, laŭ invito de Christiaan Veltkamp, instruisto de internacia (elementa) lernejo en Hoofddorp, Bert kune kun li instruos kelkajn klasojn pri Esperanto. Ŝajne, la lernantoj ŝatis tion.
Dum la jaro mortis Corine van Duivenvoorde, preskaŭ 100-jara, kaj Corrie Kwantes-Kooij. Ambaŭ aktivis en la pasinteco kiel prezidanto, resp. sekretario de la sekcio.
Vizitis kelkaj eksterlandaj esperantistoj la urbon Harlemo. En majo Iĥor, kiu fuĝis el Ukrainio, ankaŭ venis al Harlemo por iom orientiĝi pri la urbo. Lin ĉiĉeronis Bert. Kaj post la Internacia Junulara Kongreso en Westelbeers, en aŭgusto, venis Miguel Bento el Porto Allegre, Brazilo. Specialan atenton li, instruisto pri fiziko en mezgrada lernejo, donis al la instrumentoj pri fiziko en la Teyler-Muzeo. La postan tagon li vizitis Amsterdamon, irante al la Ŝtata Muzeo (Rijksmuseum), la domo de Anne Frank kaj ŝipveture tra la kanaloj.
Raportas Bert de Wit

11.5 La Amsterdama Rondo
La kunvenoj de la Amsterdama Rondo kutime okazis en la dua dimanĉo de la monato. La kunvenoj komenciĝis je la 13a kaj daŭris ĝis la 15a h. Ĝis la aprila kunveno ni kunvenis interrete per ZOOM, poste ni denove kunvenis en De Koopermoolen, Warmoesstraat 5. Samtempe ni ebligis kontakton per ZOOM.

januaro : Grava agado estis partopreno en la tuteŭropa konsultado de civitanoj. Klaus Leith parolis pri la bona rezultato de la proponoj rilate lingvoinstruadon kaj Esperanton. Li estis la motoro de la agado, sed bedaŭrinde Klaus poste mortis. Ankaŭ okazis atentigo pri la Germana Esperanto Kongreso, en kunlaboro kun Esperanto Nederland, kiu okazis en junio 2022 en Oldenburg.

februaro: Federico Gobbo parolis pri la filozofioj de *Baruch de Spinoza* (1632-1677) kaj Ludoviko Zamenhof (1859-1917). Estis multaj geesperantistoj alilandaj kiuj partoprenis la kunvenon.
marto: Peter Ebenau paroligis nin pri Esperanto-Kongresoj. Kiujn ideojn oni havas pri UK-oj kaj eventualajn alternativajn aranĝojn? Andy Blair, volontulo, helpanta la LKK-on de Montrealo, prezentis la programon de la Universala Kongreso kaj Montrealon.
aprilo: Bert de Wit prezentis bildojn pri la rilato inter infektaj malsanoj (i.a. pandemioj) kaj perdo de biodiverseco. Pri tio aperis poste artikolo en la maja numero de la revuo Monato.
majo: la 8an de majo, Inge de Bruin prezentis bildojn pri Daŭripova Akvomastrumado, prepare al la prezento dum la Germana Esperanto-Kongreso en Oldenburg, en junio.
junio: An Olijslagers prezentis pri Literaturo, libroj kaj tradukoj en Esperanto.
julio: Ĉiuj povis kontribui, respondante la demandojn kiel oni eksciis pri Esperanto kaj kial vi eklernis ĝin. Federico Gobbo multe notis dum la kunveno…
septembro: Post la ferioj ĉiuj parolis pri siaj someraj travivaĵoj.
oktobro: Kvizo pri preprozicioj, prezentita de Bert de Wit. Oni devis serĉi la ĝusta(j)n prepozicio(j)n en frazoj kun specifaj verboj.
novembro: La partoprenantoj parolis pri Libroj kiujn vi legis. Gvidis Federico Gobbo. Unu recenzo (pri “Secesio”) aperos en Monato.
decembro: Adiaŭ al 2022: kiel vi memoras la jaron? Pri familiaj okazintaĵoj, personaj (mal)bonŝancoj, (mal)agrablaĵoj, Esperanto-renkontiĝoj, i.a. la Germana Esperanto Kongreso en Oldenburgo kaj la fina kunveno en Groningen, en decembro

Ĉeestis inter 10 kaj 15 personoj. En la komenco de la jaro ni bonvenigis Igor el Ukrainio, kiu fuĝis el Ĥarkovo. Ankaŭ venis hazardaj preterpasantoj kiuj vizitis Amsterdamon. En oktobro venis rusa programisto kiu nun laboras en la urbo.
Miko kunportis la projekciilon dum la kunvenoj.
Ĉar Duolingo ne plu publikigas informojn pri kunvenoj kiuj ne estas organizitaj sub ĝia ŝildo, tiu maniero por diskonigi la kunvenojn ne plu estas uzata. Cetere antaŭe sin anoncis ofte multaj Duolingo-lernantoj sen efektiva partopreno en la kunveno. Nun la anonco de la kunvenoj aperas regule en Eventa Servo kaj en la retejo de Esperanto Nederland.
Raportas Bert de Wit

11.6 Vlissingen kaj Zutphen
En tiuj du urboj nun regule kunvenis grupo de Esperantistoj (membroj kaj ne-membroj). Dum la kunvenoj ili studas Esperanton (ekz. pere de la reta kurso de Pingveno.nl) kaj/aŭ parolas pri aliaj temoj. Mi esperas ke en 2023 ili daŭrigas la kunvenojn kaj ke mi povos raporti pli.
Raportas Ineke Emmelkamp

12. Diversaĵoj

12.1 Tradukprojekto: Baantjer - De Cock en de dood in gebed

En 2021 nia membro Peter Ebenau iniciatis la tradukon de libro, verkita de Baantjer. Temas pri la libro: De Cock en de dood in gebed. Pluraj membroj partoprenas.
La oficiala eldonejo ‘De Fontein’ donis al Esperanto Nederland la licencon traduki la libron en Esperanton, por la periodo de 5 jaroj (ĝis la 11a de marto 2026) tutmonde.
La kunlaborantoj kaj lingvaj kontrolistoj uzas la Zoom-abonon de Esperanto Nederland.
En 2022 la projekto daŭras.

12.2 Kultura tago Woudrichem
Sabaton, la 25-an junio, okazis la Kultura Tago en Woudrichem. Tio estas malgranda fortikaĵa urbo en Nordbrabando ĉe la rivero Merwede. Ĉirkaŭ 30 homoj (membroj kaj gastoj) venis por partopreni la diversajn erojn. Marc van Oostendorp bonvenigis la partoprenantojn en la kafejo 'Gewoon Ploon'.

Poste ni povis promeni aŭ traduki poemojn kun Karina Scharff. Post tagmanĝo okazis vizito al la historia-fiskapta muzeo, kie Kajto (Ankie kaj Nanne) prezentis kelkajn kantojn por ni, poste ni ĝuis belan Kajto-koncerton ĉe 'Ploon'. Vespere ni povis manĝi ĉe la familio Duyvendak. Vidu ampleksan fotoraporton de Andries Hovinga en la Fenikso 2022/5. La organizantoj estis Jorine Captein, Smaranda Tintu kaj Korine Cheizoo.
Antaŭ la kafejo Ploon ni starigis du grandajn informilojn pri Esperanto kaj disdonis informilojn. En montrofenestro de librovendejoj eblis vidi kelkajn esperantlingvajn librojn. Aperis artikolo en loka gazeto pri Jorine kaj la kultura tago.
Raportas Jorine Captein

12.4 Germana Esperanto Kongreso en kunlaboro de Esperanto Nederland,
organizita de Germana Esperanto Asocio kunlabore kun Esperanto Nederland kun subvencio de Erasmus+ (programo de Eŭropa Unio). La temo estis 'Daŭripovo'. La ĉefa kongreso okazis dum Pentekosto kun pluraj prelegoj de Nederlandanoj.
Ekde la 25a ĝis la 27a de novembro grupo de homoj el Germanio kaj Nederlando kunvenis en Groningen. Ili estis la organizantoj de Germana Esperanto-Kongreso en Oldenburg en junio 2022. . Sabate estis du prelegoj pri daŭripova lingvopolitiko de Karene Sanchez kaj Federico Gobbo. Hiddo Velsink parolis pri kiel mezuri la altecon de la tero, kio estas tre grava por kompreni la efikojn de gasminado en Groningen. Posttagmeze ni vizitis la novan imponan, modernan kaj vizitindan Forum en Groningen (daŭripove konstruita). Dimanĉa ekskurso estis tra norda parto de la provinco Groningen, kie ni vidis la de la tertremoj trafitajn vilaĝojn.Ni lunĉis en la 'Zielhoes' en Noordpolderzijl.

12.5 Libroj (malnovaj kaj novaj)
Ĉe la libroservo de UEA restis stoko de libroj de Esperanto Nederland. Ili estas komisivenditaj por ni. Pro la foriro de la libroservo el Rotterdam ni reprenis tiujn librojn. Ni donacis ilin al studentoj de la Amsterdama katedro, niaj membroj dum membrokunveno kaj partoprenantoj de studsemajnfinoj. Ni proponis meti ilin en etajn stratlibrejojn. Loes Demmendaal aranĝis la saketojn kun la libroj. La stoko nun estas disdonita, krom la stoko de 'Esperanto – Grammatica met oefeningen' de Roel Haveman kaj Arjen-Sjoerd de Vries. Tiu stoko troviĝas en keloj kaj mansardoj de kelkaj membroj.
Alia ebleco por trovi bonan lokon por la ofte malnovaj libroj estas kontroli ĉu ili jam estas en la Koninklijke Bibliotheek en Hago. La arĥivo de la KB estas facile atingebla kaj kontrolebla. Ili akceptas librojn.

12.6 Kontaktoj kun Nederlanda Esperanto-Junularo (NEJ)
Marc van Oostendorp interparolis kun Marc Konijnenberg, kiu ekde 2022 estas prezidanto de NEJ. La du organizoj planan kunlabori pli, ekzemple pri nova(j) retejo(j).

Kompilis Ineke Emmelkamp, sekretario
La 4an de februaro 2023